

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 13 Eberswalde 1986-05-02

1. Je la kapo de tiu ĉi FI ni uzas unuafoje la nomon, kiel s-ano Pachter proponas ĝin dum la labora kunveno en Leipzig okaze de IFER '86
2. Por ŝpari labortempon de la komputilo kaj paperon ni interkonsentis, ke la slipoj de la .1-versio ni elsendos nur kiel eltiraĵoj el la slipoj. Tiu kunlaboranto, kiu bezonas pluajn lingvojn, bonvolu skribi al ni sian deziron.
3. La enhavo de sl. 0076 estas sur sl. 0028.1, la, la enhavo de 0062 sur sl. 0040.1. La nocio de sl. 0093 ni disigis en la slipojn 0093.1 kaj 0076.1; la nocio de 0069.1 kaj 0062.1.
4. Dankinde organizis s-ano Marinov la elsendon de invitoj al ISEU en Veliko Tárnovo en julio 1986. Ni rekomendas kiel eble partopreni des pli multe, ĉar ŝajne AEST '86 ne okazos.
5. Ni kompletigas la liston de E-kunlaborantoj en la IFRE (v. FI6):

Luigi BARBANA; v. Montelungo 10, I-34170 Gorizia
 Zdzisław GLAJCAR; Skryta 3, PL-43-400 Cieszyn
 Cyreen KNOCAERT; Station de Recherches Forestieres, B.P.763
 Rabat (Agdal), Marokko
 Karol PACHOLCZYK mgr. inż.; ul. Spacerowa 6/17, PL-26-050 Zagnańsk
 Hans-Dietrich QUEDNAU prof.dr.; Forstwissenschaftliche Fakultät der LM-Universität
 München, Amalienstr. 52, D-8000 München 52
 Takuya TAKAHASI; Sigaku-Byĉ, Tukidatyĉ 51, Itizyĉzi, Sakyô, Kyôto 606, Japanio

0200 arb(o) elradikado	0230 arbarero, samaĝa
0201 arbidkultivejo	0231 arbarero, matura
0202 arbofungo	0232 arbarero, maldenseta
0203 trunko	0233 arbarero, pluretaĝa
0204 arbostumpo	0234 arbarero, ataranta
0205 arbopinto	0235 arbarero, tromatura
0206 branĉaro	0236 arbostoko, restanta
0207 infektita	0237 arbarero, plena
0208 traktado, silvikultura	0238 maldensigo de arbarero
0209 frostkovraĵo (de arboj Vintre) frostkovraĵo, arba	0239 inventarado, arbarera
0210 ĉirkaŭhaki	0240 limigo de arbareroj
0211 buti	0241 foretumo/#PIV/
0212 arbospec(i)o, kroma	0242 bonitado /si, ul/ de arbarero
0213 hak(o)firma	0243 arbarerdenasco
0214 almiksi	0245 arboboso de arborero; baz-arc laŭarba
0215 kontraŭlukto, biologia	0246 ŝirmrando, arbarera
0216 kontraŭlukto, kemia	0247 alto, predominanta
0217 arec, kontraŭlukta	0248 denseco, laŭkrona
0218 (bon)krona	0249 troarbarizita
0219 ŝarĝilo	0250 arbarizita, maldense
0220 ŝarĝvinĉo	0251 arbarizita, malegale
0221 observturo	0252 arbariz(it) aĵo
0222 plantejo	0253 strukturo de arbariz(it)aĵo

0223	prisemi	0254	denskvociento
0224	(mem)rejuniĝo per semoj: (mem) renoviĝo per semoj	0255	arbarizaĵ-celo
0225	sem-faligado	0256	entrepreno,forsta
0226	arbarero	0257	entrepreno, lignoprilabora
0227	arbostoko, elimina	0258	altarbar-sistemo
0228	arbarero, un uetaĝa	0259	(forsta) mastrumunuo
0229	arbarero, feŝm(it)a	0260	mastrumareo

Dr. K.-H. Simon

Eberswalde-F., 12.1.86

Tezoj al prelego de
K.-H. Simon; I. Ullrich; B.D. Marinov:
pri kelkaj spertoj dum la preparado de Esperanto-terminoj por
la forstscienceŭ

- 1) Je la formiĝo de la forstista fakgrupo ekzistis samopino, ke ni ne perdu temponen ekkreo de la forsta E-terminoj; sed ni devu ne tre rapidigi la publikigon de la rezultoj.
- 2) Ni baldaŭ ekkonais la neceson kolekti resp. krei la forstajn terminojn surbaze de difinoj.
- 3) Por la forstscience kaj forstmastrumada ne ekzistas kompleta internacie interkonsentiza difino resp. normo de la nocioj
- 4) Neceso krei de E-lingvaj difino uzante de jam ekzistaj antaŭ difinoj aprobitaj de IUFRO-komisiono kaj de nacilingvaj difinoj.
- 5) Neceso de kreado de E-lingvaj terminoj fare de forstistoj de diversaj nacilingvoj
- 6) Estas celkonforme analizi la termin-proponojn per malgranda komisiono (kunmetita plej bone de reprezentantoj de diversaj lingvoj)
- 7) La elekto de la plej konvenaj E-terminoj el la proponoj estu farata unuavice laŭ lingvaj kaj fakaj vidpunktoj kaj nur duavice laŭ plimulta vidpunkto.
- 8) Internaciismoj estas relative raraj en la forsta fakterminaro, ĉar forstmastrumado estas branĉo de ekonomio kun relative longdaŭra tradicio en la homa socio tial la terminoj estas profunde enradikita en la naciaj vortrezoroj
- 9) Dum la prilaboro de la unuaj 369 nocioj la malgranda komisiono elektis kaj proponas la asimiladon de 3 novaj vortradikoj (317 klengi; 242 bonitedo; 320 depudat-ligno) kaj la pligrandigon de la signifnuancoj por 4 vortoj (130 forstumi; 108.1stapli; 180 benko; 156 manipuli).

**Tezoj al prego de
d-ro K.-H. Simon GDR); dipl. forstisto i. Ullrich (GDR);
inĝ. B.D. Marinov (Bulgario)**

Pri kelkaj spertoj dum la ellaborado de Esperanto-terminoj por la forstscienco

- 1) Ĉe la formiĝo de la forstista fakgrupo ekzistis samopiniis pri tio, ke ni ne perdu tempon ekkrei la Esperant-Lingvajn-forst-terminojn, sed ankaŭ pri tio, ke ni ne tro haste publiku la rezultojn.
- 2) La tradukado de fakterminoj estas malfacila afero, ĉar la nocioj troviĝas ekster la sfero de la lingvo de l'ĉiutaga vivo kaj ĉar la nocioj en la diversaj landoj ne ĉiam estas samsencaj, sed pli-malpli de variita senco. xx)
- 3) Ni konsiderids necesa premiso kolekti resp. krei la forstajn terminojn surbaze de difinoj.
- 4) Sur de la campo forstsciencokaj forstmastrumado ne ekzistas kompleta internacie akordigita difini resp. normo de la nocioj.
- 5) Necesas, krei Esperant-lingvajn difinojn utiligante jam ekzistantajn difinojn, aprobitajn de IUFRO, kaj jam ekzistantajn nacilingvajn difinojn. Se ambaŭ tiaj ne ekzistas, necesas, tutnove ellabori la bezonatajn difinojn.
- 6) Estas necese, ke forstfakuloj de laŭeble plej multaj diversaj forstterminoj nacilingvoj partoprenas en la ellaborado de Esperant-lingva forstterminoj.
- 7) Estas profitige prilabori la termino-propenojn de la unuopaj forstfakuloj per malgranda komisiono, konsistanta plej bone el reprezentantoj de diversaj lingvoj.
- 8) La elekto de la plej trafaj E-terminoj el la donitaj probonoj estu farota nur laŭ lingvaj kaj fakaj vidpunktoj kaj ne laŭ la plimulto propon principo.
- xx) Kiu traduko por iu fakvorto estu valida kaj fineuzata, pri tio nur la koncernajn fakuloj povas decidi. La lingvistoj povas decidi nur pri tio, ĉu la koncerna fakvorto linve estas korekta.
- 9) Por plifaciligi la elekton de la proponitaj E-terminoj, estas profitige fiksi ĉefajn elektrokriteriojn kaj klasifiki la proponitajn terminojn laŭ taŭgecaj grupoj.
- 10) Por ke ankaŭ la faklingvo estu elasta kaj dinamiko, oni devus rezervi la aplikon de pluraj esprimvariantoj.
- 11) Internaciismoj estas relative raraj en la forsta fakterminaro, ĉar la forstmastrumado estas branĉo de ekonomio kun relative longdaŭra tradicio en la homa socio, kaj tial la terminoj estas profunde enradikiĝintaj en la naciaj vortrezoroj.
- 12) La kreado kaj enkonduko de novaj vortoj estas neeviteblaj pro la sekvaj konsideroj:
 - por atingi plej altan trafecon de nocioj
 - por eviti pli longajn parafrazojn de nocioj
 - por teni la lingvon elasta kaj dinamika
 Sed oni ne troigu kaj limiĝu je esceptoj.
- 13) Dum la ellaborado de la unuaj 360 nocioj la malgranda komisiono elektis kaj proponas la akcepton de 6 novaj vortradikoj (0009 intercepcio; 0242 bonitado; 0288 litiero; 0317 klengi; 0320 depudato) kaj la pligrandigon de la signifo de 7 PI-vortoj (0050 etato; 0073 kvartalo; 0130 forstumi; 0108.1 stapli; 0156 manipuli; 0180 benko; 0303 haŭli).

Korektita k. kompligitita versio de la artikolo
K.-H. Simon

Multilingva forstfaka vortaro farita helpe de esperantistoj

D-ro Karl-Hermann SIMON; Ingward ULLRICH;
(Germana Demokratia Respubliko)

En la jaro 1982 en Eŭropo kelkaj esperantistoj, laŭ profesie forstistoj, komuniĝis inter si, ke la tempo maturiĝintus, fondi internacian fakgrupon de forstistoj esperantistaj. Ili samopiniis pri tio, ke unu el la ĉefas taskoj de tiu fakgrupo estu la kreado de E-lingvaj forstaj terminoj. Ĝis nun ekzistas nur listo de kelkaj nocioj en la bildvortaro E-lingva de R. Eichholzkaj en ne publikigita "Forsta kaj ĉasafakvortaro" (germana Esperanta) de E. Kleemann. La lasta enhavas ĉ. 3000 kapvortojn, sed laŭ ekspertizo, farita de la aŭtoro de tiu ĉi artikolo, la duono de la E-terminoj ne estas taŭgaj. Unu el la kaŭzoj de tiu malsukceso estas la manko de difinoj.

Ekde la jaro 1983 nia internacia forstista fakgrupa ellaboras surbaze de E-lingvoj difinoj multlingvan forstan fakvortaron. En 1984m dum kunveno de la fakgrupanoj en Brno (ĈSSR) la ne german lingvanoj proponis, indiki la difinojn ankaŭ germanlingve pro la graveco de la germana lingvo en la forstscienco. Dekomence la fakgrupanoj samopiniis pri la multilingveco de la vortaro por utiligi ĝin ne nur por esperantistoj, sed ankaŭ por ne-Esperanto-parolantaj fakuloj, pri la senprokrasta komenco de la ellaborado de E-lingvaj forstaj terminoj, pri la konstanta kompletigo de la labormetodoj, pri la laŭetapa prilaborado de la forsta vortrezoro koncerne la gravecon de la nocioj kaj pri la eldono de la rezultoj post revicio fare de E-lingvisto(j).

Intertempe formiĝis kolektivo, konsistanta el kunlaborantoj de 11 nacilingvoj. Helpas ne nur esperantistoj, sed ili estas la perantoj kaj ĝis nun la ĉefas agantoj. Ĉiuj kunlaboras libervole, senpage kaj ofereme, konforme la ideon de Esperanto.

La centro de la fakgrupo troviĝas en Eberswalde en la Germana Demokratia Respubliko, la loko, kie en la jaro 1830 la forstsciencisto F.W. Leopold Pfeil fondis la famekonatan Forstakademion. Ĝis nun la centro eldonis 500 nocio-slipojn kun nacilingvaj ekvivalentoj laŭ disponeblaj vortaroj. La unuopaj kunlaborantoj el la diversaj landoj ricevas tiujn nocio-slipojn kiel bezon por ellabori siajn proponojn por la terminoj laŭ la donitaj difinoj. La alsenditajn proponojn al la centro en Eberswalde prilaboras malgranda komisiono de la fakgrupo. Ĝis nun tiu ĉi komisiono eldonis 200 E-lingvajn forstajn terminojn. De la komenco de nia vortara laboro la enhavo de la nocio-slipoj estas registrata maŝinlegeble sur trubendo. Tiu ĉi agmaniere raciigos la tutan prilaboradon, la multobligon, la korektadon, la kompletigon, la ordigon kaj la presadon inkluzive.

Nuntempe la fakgrupo aperigas malgrandan bultenon "Forstista Informilo" (ĝis nun aperis 12 numeroj) por membroj de la fakgrupo. Tiu bulteno povus esti la komenco de E-lingva "Forstgazeto Tutmonda". En tiu gazeto forstfakuloj el la tuta mondo havus eblecon publikigi esplor-rezultojn kaj interŝanĝi opiniojn kaj spertojn, kio ja tre gravas, konsidere al la mondscale kaj konstante antaŭ en marŝantaj arbarmortigo kaj arbardetruando.

La forstista fakgrupo daŭre klopodas trovi pluajn kunlaborantojn, precipe de nacilingvoj, kiuj gravas por la forstmastrumado. Ankaŭ en Popola Ĉinio ĉiam pli kaj pli kreskas la graveco de la mastrumado de arboj kaj forstoj. Interesuloj por la kunlaborado en la internacia fakgrupo de forstistoj esperantistaj bonvolu skribi al d-ro Karl-Hermann SIMON, C.-V.-Ossietzkystr. 21, DDR-1300 EBERSWALDE – FINOW, Germana Demokratia Respubliko.

Artikolo por ĉina revuo
Multilingva forstfaka vortaro helpe de esperantistoj
K.-H. Simon, I. Ullrich

Dum la jaro 1982 en Europo kelkaj esperantistoj, laŭ profesio forstistoj/arbaristoj, interkomuniĝis inter si, ke la tempo maturiĝis, formi internacian fakgrupon de E-forstistoj. Ni samopiniis, ke unu el la ĉefaj taskoj de la fakgrupo estu la kreado E-lingvaj forstaj terminoj. Ĝis nun nurekzistas listigo de kelkaj nocioj en la E-lingva Bildvortaro de Eichholz, R. kaj en la ne publicita "Forsta kaj kasa fak-vortaro" de E. Kleemann. La lasta ja enhavas ĉ.3000 terminojn, sed laŭ propra testo duono da E-terminoj estas netaŭgaj. Unu el la kaŭzoj por tiu malaukoeso estas la manko de difinoj. De post la jaro 1983 ni preparas surbaze de E-lingvaj difinoj multlingvan fakvortaron. En 1984 dum la kunveno de la fakgrupo en Brno (ĈSSR) la ne-germanlingvaj anoj proponis, indiki la difinojn ankaŭ germanlingvajn pro la graveco de la germana lingvo en la forstscienco. Dekomence la fakgrupoj samopinitis pri la multlingveco de la vortaro por uzebligi ĝin ne nur por esperantistoj sed ankaŭ por ne-E-perolantaj fakuloj, pri la senprokrasta komenco de la kreado, pri la plua kompletigo de la metodoj dum la laboro, pri la laŭetapa prilaboro de la forsta vortrezoro laŭ la graveco de la nocioj kaj pri la eldono de la rezultoj post revizo fare de E-lingvisto(j). Intertempe formiĝis kolektivo de kunlaborantoj de 11 nacioj. Ne nur esperantistoj helpas, sed la esperantistoj estas la perantoj kaj ĝis nun la ĉefaj agantoj. Ĉiuj kunlaboras libervole kaj senpage, ofereme kiel konformas la ideon de Esperanto. La cento de la fakgrupo en Eberswalde-Finow (Ebersvalde-Fino) en GDR eldonis ĝis nun 500 slipojn=nociojn kun nacilingvajn ekvivalentojn laŭ disponeblaj vortaroj. La resenditaj proponoj por la terminoj laŭ la donitaj difinoj estas prilaborataj per malgranda komisiono de la fakgrupo. Ĝis nun ĉi komisiono eldonis 200 E-terminojn. Dekomence de nia vortara laboro la enhavo de la slipoj estas registrataj maŝinlegeble. Tiu ĉi agmaniero raciigos la tutan prilaboron, la pliobligon, la korekton, la kompletigon, la ordigon kaj la preson inkluzive.

La laborgrupo konstanteklopodas trovi pluajn kunlaborantojn speciale de nacilingvoj, kiuj gravas por la forstmastrumado. Ankaŭ en Popola Ĉinio ĉiam pli kreskas la gravecon de la mastrumado de arboj kaj forstoj.

Interesuloj por la agadoj de la fakgrupobonvolu skribi al

d-ro Karl-Hermann SIMON
C.-v.-Ossietzkystr. 21
EBERSWALDE-FINOW
DDR-1300